ISSN 0299-092X

# monda solidareco

N-ro **108 - Aprilo 2013** - kvaronjara - **1.25 €**

## *Ni marŝis !*

## *"Jan Satyagraha "*

La **2an de oktobro 2012** komenciĝis en Barato [Hinda Unio] unu el la plej ampleksaj neperfortaj agadoj iam organizitaj : la marŝado ***« Jan Satyagraha »*** laŭ la nomo de tekniko iniciatita de Gandhi por signifi « *la aktivan traserĉadon de la vero, de la justec*o ».

Kaj al Nov-Delhio survojiĝis malriĉuloj, kamparanoj senigitaj je siaj agroj, dalitoj milope, dekmilope por advokati siajn rajtojn je vivfontoj, sian rajton vivi en digneco.



*MSM partoprenis en la marŝado en Francio*

## *Ili ne estis solaj !*

La movado Ekta Parishad preparis tiun marŝadon dum multaj jaroj, ne nur en Barato, sed ankaŭ en Ameriko, en Afriko, en Eŭropo.

**Ekta Parishad**
(« Forumo de unueco » en Hindia lingvo) estas popola movado fondita en 1991 en Barato, kiu agadas laŭ la Gandhia principo de neperforta agado, kun la celo helpi la popolon plibone kontroli la rimedojn, kiuj ebligas ĝin vivteni : tero, akvo kaj arbaro. Rajagopal P.V. estas ĝia fondinto kaj prezidanto.

En multaj lokoj tra la planedo, homoj ekmarŝis ĉar iliaj rajtoj estis tuŝitaj aŭ pro solidareco. Ofte ne instruitaj la kamparanoj ne sciis aŭ ne povis konservi siajn praulajn terojn : la leĝoj de ilia lando ŝanĝiĝis, katastro estis kreita, kaj ili ne sciis tion. Tiam gravaj « proprietuloj » venis tenante la pruvilojn, ke de nun la terenojn ili posedas, ĉar ili estis la unuaj, kiuj enregistris ilin, kaj ili forpeligis la « kontraŭleĝajn okupantojn » kaj ties familiojn, kiuj iris plidensigi la ladkvartalojn de Kolkato, Abiĝano, San-Paŭlo, Meksikurbo... Aliaj rimedoj por akapari la terojn instaliĝis per ŝtatpintaj komplicecoj. Sed tio ne estas ĉio : la agrikulturistoj, kiuj sukcesis resti en sia loko, kaj kiuj uzis memproduktitajn semojn, vidis sin sen permeso plu uzi tiujn tradiciajn semojn, ĉar la gravaj « akaparantoj » patentigis ankaŭ tiujn semojn sub siaj nomoj.

## Enhavo

Jan Satyagraha ! ........ p. 1
Kongio : la situacio ........ p. 2
10 tagoj por la frateco en Lagega Afriko ........ p. 3
Solidareco Bona Vola ........ p. 4
Katana : la seminario ........ p. 5
konklude ........ p. 6
La vojoj de la solidareco ........ p. 7
Je via dispono - kotizoj - kolofono ........ p. 8


## *Ili ne estis solaj !*

**La 26an de majo 2012**, en Katana (Sud-Kivuto, Kongio) la 50 partoprenantoj en la Seminario de Tutmondismaj Studoj unuvoĉe adoptis la deklaracion de solidareco kun la marŝado Jan Satyagraha : ankaŭ en Kivuto la nesekurecaj kondiĉoj estas idealaj por la akaparado de la teroj : kvin milionojn da hektaroj jam akaparis la gravaj potenculoj.

è *p. 8* è

## Ĝenerala situacio

De du jaroj la okcidentaj gravaj amaskomunikiloj kaj kelkaj afrikaj gazetoj atentigis sian publikan pri la « araba printempo », kaj antaŭ nelonge pri la situacio en Malio. Dume la eventoj oriente de Kongio plu estas forlasitaj, kaj tamen ! ĉirkaŭ la grandaj lagoj Albert, Eduardo, Kivuo, Tanganjiko, la loĝantaro vivas en penigaj, dramaj kondiĉoj, kies el kiu elirejo ne aperas. La ciferoj ŝanĝiĝas ĉiun tagon kaj ili estas alarmigaj : 1.500.000 homoj delokitaj, t.e. homoj, kiuj devis forlasi siajn loĝlokojn, siajn vilaĝojn pro malsekureco, por vivi laŭ la tervojoj, de improvizita kampadejo al alia ; 5.300.000 homoj suferas pro malsato, pro misnutrado.




*La regiono de la Grandegaj Lagoj*

Tamen ni estas ja en la potenciale plej riĉa lando en la planedo, tiom riĉa, ke ĝi allogis la avidecon de la « ŝarkoj » de la monda ekonomio por ekspluati ĝian ercojn kaj juvelajn materiojn, tiom riĉa, ke la kampara loĝantaro estas premtrudata al ekziliĝo, disvagado, kaŝeco. La malsekureco venas de militistoj nomitaj « ribeluloj » aŭ « banditoj », sed kun plej diversaj devenoj : al la grupoj el kongianoj aldoniĝas ekde 1996 ruandanoj, ugandanoj, burundanoj, kaj de ne longe sudananoj, ne forgesante la dungitajn soldatojn.

Fronte al ili, la « armitaj fortoj de Kongio » (FARDC) ne sufiĉas malgraŭ la taktikan helpon ricevatan de Unuiĝintaj Nacioj : la « MONUSCO » (Misio de U.N. por la stabiligo en Kongio), konsistanta el 19.000 soldatoj venintaj de 59 landoj. Tiu konstanta nesekureco pravigas la ekziston de lokaj memdefendaj milicoj : la « Maï-Maï » inter aliaj, kies aliancoj varias laŭ la momenta intereso. El ĉiuj militantaj fortoj, nur MONUSCO disponas pri provianta administracio respondantaj al ĝiaj prinutraj kaj vivtenaj bezonoj (tio kostas jare unu miliardon da Eŭroj al U. N.). La FARDC provas esti neriproĉeblaj, sed la aliaj vivtenas el ŝtelado, rabado de brutoj kaj de rikoltoj sub la minaco de armiloj kaj de ĉiaj perfortoj : torturoj, forraboj, seksperfortoj, brulegoj kaj detruoj.




*Tanko de U.N. apud Rutshuru (Nord-Kivuto)*

Fronte al tio, la civila loĝantaro de la koncernataj provincoj (20 milionoj da homoj) rezistas kiel eble plej bone per neperfortaj metodoj : ĝi manifestacias por paco, por sekureco, kontraŭ la « balkanigo » de la lando ; ĝi organizas renkontojn, seminariojn ; ĝi pene antaŭenpuŝas sian propran evoluadon, plej ofte sub la patronado de lokaj civilaj kaj politikaj aŭtoritatuloj kaj malgraŭ la policaj aŭ militistaj ĉikanaĵoj : vojbaraĵoj, zorgemaj kontroloj, neleĝaj moneltrudoj.

La vetoj kaj strategioj de la nunaj konfliktoj estas prezenteblaj dum prelegoj en franca kaj en Esperanto. Ne ĉio povas esti skribita en tiu ĉi bulteno

Okazas reala aktiveco : uzinoj kaj laborejoj funkcias, la lokaj bazaroj estas regulaj malgraŭ manko de varprovizado ; 75 % de la junuloj visitas la lernejojn.

## Historia ĉeesto de Monda solidareco kontraŭ la Malsato

La ĉeesto de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato en la Lagega regiono estas tiom malnova kiom la organizaĵo mem : en 1983 ni nombris 162 membrojn en Ruando, kie ni financis kamparanan klerigejon ; en 1987 ni financis la nutrocentron de Mboko ; en 1991 Odile kaj mi iris unuafoje en tiun regionon, kie ni informiĝis pri la Komunuma Evolu-Centro de Kiringye, regita de D-ro Miteyo Nyenge, kaj tie instaliĝis projekto de kultivado de spirulino dank'al suda-suda partnereco inter tiu « zaira » centro kaj la projekto « Solarium » en Ĉilio.

La katastrofoj de la diversaj konfliktoj, ekde 1996, ne ĉesigis la antaŭeniradon de niaj « tutmondismaj » idealoj. Tute male multaj estas tiuj, kiuj mem konsciiĝis, ke ilia regiono fariĝis ekonomia vetcelo por ia mondo de « ĉiu por si mem ». Nepre necesas fondi mondan unuecon surbaze de valoroj de solidareco, respekto, civitaneco. La difino de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato jam troviĝas en tiu postulato. La afero estas tuj komprenita, sed por eviti elreviĝojn, necesis renkonto. Tiel naskiĝis la projekto de seminario en la proksimeco de Bukavu, kun paso tra Goma, norde, kaj laŭeble tra Uvira, sude.



*Nia alveno en la ŝiphaltejo de Katana.*
*De maldekstre dekstren : Aimé Ruzuba Bisimwa, Birindwa Mushosi, Daniel, Daniela, Odile*

Ni alvenis tra Kigali, en Ruando, kie ni estis akceptitaj de Birindwa Mushosi, fame konata esperantisto, kaj Aimé Ruzuba Bisimbwa, prezidanto de la asocio « Monda Solidareco – Kune Agadi » (MSKA/ SMAE).

Ili certigos nian sekurecon laŭlonge de nia restado. Antaŭ la ekiro el Kigali, ni ricevas la viziton de Barthelemy, civitano de la mondo, kiun ni retrovos dum nia reveno.

## Goma : « Solidareco – Bona Volo »

La unua stadio estis Goma, ĉefurbo de Nord-Kivuto, kie ni estis akceptitaj de Alexio Bengantundu, Alfonso Wazeka kaj Johana Mutchozi, responsantoj de la asocio « Solidareco – Bona volo » (Vd en Monda Solidareco n° 106, p. 5). Nun ni povas konfirmi ĉion, kio estis skribita en tiu bulteno : dudeko da infanoj estas tie. Orfoj pro la milito aŭ pro Aidoso, infanoj en granda angoro, ili estas akceptataj de la asocio, kiu pagas por ili la lernejajn kostojn, kaj plie instruas al ili Esperanton kaj moralon. Por tiuj infanoj Alexio estas kvazaŭ patro.

Krom kelkaj donacoj maloftiĝantaj, kiuj venas de Eŭropaj amikoj, la rimedoj de la asocio estas la profito de la aktiveco de « kantino », speco de kooperativa butiko. En ĝi oni trovas iom da ĉio, kion bezonas fidela klientaro : nutraj kaj domaj produktoj, paperaĵoj, zorioj … ĉio estas bone ordigita ; ĉiu enspezo, ĉiu elspezo estas skribitaj en kontlibron. Pluraj inoj laŭvice deĵoras en la kantino, sub la ĝenerala responso de Johana.

## Kokinetoj, globidara projekto

Alia monrimedo por la asocio estas la produktado de ovumontaj kokinetoj.

Simpatianto metis je la dispono de Solidareco Bona Volo etan parcelon, kie estis konstruita eta kokidejo : en ĝi ni vidas 60 junajn kokinetojn tri aŭ kvar-semajnaĝajn. Alfonso responsas pri tiu bredado. Kiam ili estos trimonataj ili estos vendataj ; tiel la aĉetantoj povos valorigi la kuirejajn kaj vegetalajn rubojn per la produktado de ovoj por la familia konsumado. Sed la posedanto informis la asocion, ke la parcelo estos baldaŭ vendata por la konstruado de domo. La projekto de Solidareco-Bona Volo estas trovi pli grandan parcelon, kiu ebligus al ĝi ne nur produkti kokinetojn, sed ankaŭ produkti ovojn por la vendado en la kantino. Ankoraŭ troviĝas disponeblaj parceloj en Goma, sed la migraj, sekurecaj kaj demografiaj premoj malfaciligas la trovon de parcelo kun prezo, kiu ne superu la amortizkapablojn de tia projekto. Tie kuŝas la problemo.



*la kokidejo de SBV (Goma)*

Nia ĉeesto en Goma estas okazo por la asocio kunvenigi en ĉambron de la hotelo « Le Nyira » kelkajn el siaj membroj kaj kelkajn proksimajn globidaranojn : ni estos apenaŭ dek-kvin membroj de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato por interparoli pri la filozofio kaj la aktivecoj de nia transnacia mutuala asocio.

# en Lagega Afriko

## Katana - La Seminario

Frumatene de la tria tago la tri animantoj de Solidareco – Bona Volo, niaj du akompanantoj kaj ni mem kuniĝas en la haveno de Goma por enŝipiĝi sur rapidan busoŝipon kaj transiri la lagon al nia celo « Katana », en Sud-Kivuto, kvarhora veturado por 10 USD popersone. La volkano Nyiragongo malaperas en brumo dum ni laŭiras la altaĵojn de Kalehe. Dum nia restado, en tiuj montaroj bataletoj okazis inter ribela grupo kaj la Kongia armeo « FARDC ».



Parto el la georfoj, kiujn prizorgas « Solidareco – Bona Volo » (Goma)

Ni elŝipiĝas en la haltejo de Katana, akceptitaj de malgranda delegacio de Civitanoj de la Mondo. Bonvenigas nin per deklamita poemo Daniela, 10jaraĝa filino de Aimé Ruzuba. La gastejo « Les Rosiers » (La Rozujoj) estos dum ses tagoj nia restadejo agrabla kaj bone protektita.

Vespere kunvenas la pedagogia teamo de la Seminario de Tutmondismaj Studoj. Tiu ĉi okazos sub la honora prezidado de Aleksio Bengatundu, ĉar elektita Delegito al la Kongreso de la Popoloj, kaj animata de Alfonso Waseka kaj Birindwa Mushosi. 50 homoj partoprenis dum la kvar labortagoj pri temoj esencaj por la Kivutanoj : respekto de homaj rajtoj, respekto de la vivo, serĉado de la paco, la biena juro kun rimarkinda prelego de Majstro Nzana, responsanto de la Sud-kivuta katastro, kaj aliflanke civitano de la mondo. Ĉiuj responsantoj de globidaraj grupoj kaj projektoj en la regiono de Bukavu partoprenis en la Seminario.

Rimarkindaj estas la penoj de kelkaj partoprenantoj, kiuj piediris dum pluraj horoj matene kaj vespere por partopreni en tiuj kvar tagoj de renkonto.

Rezolucioj estis voĉdone adoptitaj laŭ la laboroj en fakaj kaj plenaj kunsidoj. Tiuj rezolucioj temas ĉefe pri la loka situacio laŭ vidpunkto de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Decidoj estis faritaj, interalie la konsistigo de Pluzorga kaj Kunordiga Buroo (PKB) de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato  Tiu komitato funkcios kiel fako de « Monda Solidareco – Kune Agadi ».

## Projektoj – Arbo de monda unueco

Dum la tago antaŭ la seminario, ni veturis al Kasheke, vilaĝo de Mbinga-Sud, por viziti tie projekton de akvo-energia mikrocentralo, kondukita de MSKA. Ni estis akceptitaj de S-ino ***Gaudiose Shwagi Lushombo***, vilaĝestrino, kiun ĉiuj nomas « ***Panjo*** ».

# 10 tagoj por la frateco en Lagega Afriko

La aranĝado estis daŭronta ankoraŭ pli ol unu monato por remasoni la kanaleton kaj instali la turbinon malsupre de la premdukto.

Poste ni rekuniĝis antaŭ la hejmo de la ĉefino por tie planti arbidon de monda unueco.

Tiuj dek tagoj de renkontoj jam troviĝis resumitaj per tiu alte simbola ago.



S-ino Gaudiose (vilaĝestrino) ĉe la premdukto en Kasheke (Sud-Kivuto). Fone : la lago Kivuo

Ni planis viziti plurajn projektojn de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato, tiun de PROSPADEC, apud Bunjakiri, la fiŝkooperativon de Ĉifunzi, la Komunuman Evolucentron de Kiringje, kaj plurajn grupojn en Uvira, same kiel plurajn mondcivitanajn teritoriojn de la regiono de Bukavu, sed la cirkonstancoj devigis nin rezigni pri tio.

Do kun plifrueco de unu tago ni revenis en Kigali, kie atendis nin grupo de mondcivitanoj, kun kiu ni dufoje kunsidis.

## *Konklude*

Ni sciis, ke tiu vojaĝo prezentis kelkajn riskojn kaj ke ni ne povis esti certaj plenumi la tutan programon, ĉefe pro sekurecaj kialoj, sed ankaŭ pro kelkaj mankoj ĉe la organizintoj en kunteksto de kultura perturbo. Ankoraŭfoje ni volas tie ĉi danki al ĉiuj kiuj akompanis nin dum tiuj du semajnoj.

En Kigali, Goma, Katana, Kasheke, ni ekhavis kontaktojn kun ĉirkaŭ 150 homoj por konstruaj, esperigaj interŝanĝoj. Ni certas, ke la « podokarpo » plantita en Mbinga-Sud estos protektita kaj ke la memoro de tiuj du solidarecaj semajnoj estos tie prizorgata.



: Fino de la seminario en la gastejo « La Rozujoj »

*Daniel et Odile Durand*

# La vojoj de la solidareco

## Burkinio



Bakary Ouattara

La grupo Koboro en Dodougou, prezidata estas ***Bakary Ouattara***, pretiĝis repagi la ceteron de la pruntopreno por la financita projekto sed sin turnis al solidareco de proksimeco : En 2011 la rikoltoj estis tiel malabundaj, ke kelkaj ne plu havis nutrajn rezervojn. Tial la grupo Koboro vendis la grenojn pasintjare stokitajn por sociala prezo al la bezonuloj. Tiuj, kiuj ne havis monon ricevis iun kvanton, kiun ili sin devontigas repagi fine de la kampanjo, ĉar la jaro 2012 estis pli bona ol 2011.

## Benino




La dekoracion per la insigno de MSM ĉe la supera akvujo (Vd en MS N-ro 107, p. 10) iniciatis mem ***Jean Anato***, prezidanto de la Grupo de la Junaj Agrokulturistoj en Come, kaj prezidanto de PKB Globidar-Benino

Tiamaniere ĉiuj vilaĝanoj, kiuj venas sin provizi per akvo, ekkonas la ekziston de MSM.

**Brave !**

## Togolando

***John Agbeli*** kaj ***François Têté***, prezidanto kaj sekretario de la PKB Globidar - Togolando, post konsento de la Federacia Adminnistra Konsilantaro, sendis financpeton al la Ambasadejo de Francio en Togolando en la kadro de la Sociala Fonduso por la Evoluigo de Togolando. La subvencio estus ebligonta al tri grupoj de « Malalta-Mono » ricevi financadon laŭ nivelo, kiun MSM ne plu povas nun certigi. Bedaŭrinde la peto ne ricevis aprobon. Tamen ni salutu belan iniciaton kaj la dinamismon, kiu vigligas la PKB de Lomeo !



John Agbeli kaj François Têté



## Waabaaa !!!

De pluraj jaroj ŝi estis fidela observantino de la laboroj de la Administra Konsilantaro. Dum la kunsido, kiu okazis en marto 2013, ***Chantal Benoist*** kuniĝis kun la laborgrupo, kiu havas realan bezonon plifortiĝi. Ŝi estis unuvoĉe kunelektita. Bonvenon al ŝi !

å p. 1 å

## *Ili ne estis solaj !*

**La 2an de oktobro**, en Savennières, en Francio, preskaŭ la tuta Federacia Administra Konsilantaro de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato trairis unu el la stadioj de la marŝado Jan Satyagraha, kiu iris de Le Croisic ĝis Parizo « por la justeco, la rajto je nutrado, je tero, je akvo, je semoj, je arbaroj ». **La 17an de oktobro** tiu marŝado atingis sub fortega pluvo la placon de Homaj Rajtoj, kie la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estis proklamita la 10an de decembro 1948. Tie ili kuniĝis kun tiuj, kiuj manifestaciis okaze de la Internacia tago por eliminado de la mizero.

**La 17an de oktobro,** ni informiĝis pri la venko de la Barataj kamparanoj : la Barata registaro fleksiĝis antaŭ tiu depostula manifestacio en Barato kaj tra la tuta mondo : interkonsento estis subskribita laŭ dek punktoj por esti poste submetita al la Barata parlamento.

Nun iuj kamparanoj reintegriĝis en sian vivmedion, tie, en Barato.

Je la nomo de milionoj da indiĝenaj kamparanoj, kiuj estis forpelitaj el siaj vivlokoj, el siaj teroj, el siaj arbaroj aŭ al kiuj oni malpermesas la uzadon de iliaj semoj aŭ la irigadon de iliaj kampoj, ni daŭrigos la batalon per niaj plenaj fortoj kaj per ĉiaj neperfortaj rimedoj utiligeblaj, por la traserĉo de la vero, de la justeco.

*Daniel Durand*



## La Butiko

T-ĉemizoj el blanka kotono kun blua emblemeto, je mezuro M, L, XL

Globskribiloj kun emblemeto

Restas ankoraŭ ĉemizetoj kaj trikotĉemizoj kun la historia emblemeto « Fonds Mondial de Solidarité contre la Faim » (vd ĉi-sube)

*Ekster Eŭropo, vi kontaktu vian administranton.*

Povas okazi malfruiĝoj en la poŝtado (eĉ pli malbone : eraro de ordigo !) Ne hezitu sendi al ni amikan rememorigon. Ni estas volontuloj kaj ĉe ni nenio estas « aŭtomatigita » !

monda solidareco **estas bulteno eldonata de *Monda Solidareco kontraŭ la Malsato***

**JE VIA DISPONO :**

- Aliĝiloj
- Flugfolioj pri projektoj
- Pliajn bultenojn
- Federacia Reglamento de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato
- Afiŝetoj (A3-formato)

*Bonvenas partopreno en la sendokosto (3 € aŭ pli)*

*Nur por Eŭropo :*

- Blankaj ĉemizetoj : 20 € - trikotĉemizoj 15 € kun la emblemeto *« Fonds Mondial »*.
- Kovertoj DL (11 cm x 22 cm) *« Solidarité Mondiale contre la Faim »* + emblemeto : 6 € por 100 + sendokosto : 3 €
- Fotoj paperaj aŭ elektronikaj.

*Se vi konstatas malfruiĝon en la liverado (aŭ forgeson !) vi bonvolu fari al ni amikan realvokon ! Antaŭdanke.*

**KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ :**
***Kiel pagi ?***

Äper franca ĉeko al **Globidar**

Äper poŝtaj rimedoj, je la nomo de :
**SMF- MONDA SOLIDARECO**
(PĈK-CCP PARIS 10.734.96 Z)
RIP:
**FR21 2004 1000 0110 7349 6Z02 056**

Ä per banka karto aŭ **PayPal** tra la ttt-ejo

Ä ankaŭ per monbiletoj enŝovitaj en ordinaran koverton.

ÄFEL kaj UEA kontoj : **mfsk-g**

*Librotenado je la sama adreso kiel la bulteno*

Sur la adresetikedo de la koverto aperas la proksimuma dato de via lasta financa partopreno. Vi bonvolu kontroli ĝin !

**RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ**

| | |
|---|---|
| Oktobro 2012 | 1 253 € |
| Novembro 2012 | 673 € |
| Decembro 2012 | 2 925 € |
| Januaro 2013 | 1 014 € |
| Februaro | 427 € |

*MONDA SOLIDARECO* estas eldonita en Esperanto, kaj franca lingvo.

**Jara abono : 5 €**

**Redakcia komitato** : Danièle Charier, John De La Cruz, Daniel k Odile Durand, Edwige Geniteau, Christian Trianneau, Jean-Pierre Bouré, Claudine Tournier.
**Fotoj** el la fototeko de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato **Desegnoj** : Yamsina Sahraoui
Elfrancigis Daniel Durand,
Kontrolis (ne)
Directeur de la publication : Daniel Durand
CPPAP n° 0410 G 86482.
Imprimerie de l'association.

Tel : +33 (0)241 78 47 75
info@globidar.org
**www.globidar.org**

*MONDA SOLIDARECO*
Les Nids
**FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE**
Francio